I

Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj, listigitaj laŭ lando kaj urbo

Argentino En la ĉefurbo de Argentino ( Buenos Aires) funkcias Biblioteko de Bonaera Esperanto-Asocio. Ĝi havas katalogon slipan laŭ aŭtoroj kaj laŭ titolo de la verkoj. 24oo libroj kaj ĉ. loo kompletaj jarkolektoj de E-gazetoj ampleksigas grandan kolektaĵon. Mi menciis la staton (aktualan) antaŭ 12 jaroj, laŭ la libro de Marinko Ĝivoje ( Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj ).

Aŭstrio Nia kongresurbo , Vieno, donas lokon al la plej granda Esperanto-biblioteko, al la renoma Internacia Esperanto-Muzeo, fondita en 1929, laŭ propono de ~~Leono~~ Felix Zamenhof. Lian ideon realigis S-ro Hugo Steiner. En 198o Ĝivoje mencias 17721 librojn kaj jarkolektojn de 3o27 diversaj gazetoj. Nun ni povas kalkuli ĉ. je ~~19~~ 20 mil librovolumoj kaj 8 mil kompletaj jarkolektoj de diversaj planlingvaj periodaĵoj. Ekzistas slipa katalogo, krome laŭtema, faka katalogo aperigitaj antaŭ multaj jaroj. La temo de nia konferenco elektiĝis ĝuste pro la kongresurba grava biblioteko. 1

La alfabeta listigo alportas denove tre gravan bibliotekon :

Belgio Rilate al la ĵus menciita IEM, la E-fako de la Urba Biblioteko en Kortrijk estas relative juna, la solena inaŭguro okazis antaŭ iom pli ol 18 jaroj. Laŭ bona iniciato ĝi fakiĝis ĉefe pri periodaĵoj. Nun en la bone zorgita moderna biblioteko oni trovas jam pli ol 6 mil kompletajn jarkokektojn de diversaj planlingvaj ( ĉefe Esperantaj) periodaĵoj, krome pli ol 8 mil librojn. La zorga kompletiga laboro de S-ro Cezaro Vanbiervliet donas brilan ekzemplon al la junaj bibliotekoj. Oni ne bezonas multajn jardekojn por atingi la kvanton kaj speciale la nivelon de niaj plej gravaj kolektaĵoj. Laŭ duoblaĵoj ( pli ol 2o mil pecoj) ĝi same staras sur la unuaj lokoj. Multaj seriozaj esperoristoj studis jam en tiu ĉi biblioteko. 4

Brazilo 3 En la plej granda urbo de Brazilo , en Rio de Janeiro oni trovas du E-bibliotekojn , kiuj havas po pli ol mil volumojn . La unua estas biblioteko de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, la dua apartenas al Brazila Esperanto-Ligo. En la grandega lando oni
4 povas konsulti eĉ trian pli ol mil-voluman bibliotekon, en Fortaleza.

Britio Kun granda ĝojo mi rememoras la rapidan kaj helpan respondon de William Auld, al mia modesta peto. Li detale respondis miajn demandojn kaj sendis multajn periodaĵojn, kiuj kompletigis ĉe mi 6 novajn volumojn. Nia eminenta poeto, redaktoro fondis sian
5 bibliotekon en 1947. Nun li povas konsulti (hejme) jam pli ol 2,5 mil librojn . La ~~homo de la~~ malgranda loko, kie troviĝas tiu ĉi riĉa Esperanto-biblioteko — certe Vi scias — nomiĝas Dollar.

La sekvaj datumoj, informoj eble surprizos kelkajn el inter ni, kvankam la miskompenon kaŭzos ne ĉi tiu teksto, sed eble kelkaj ĝisnunaj misaj interpretoj. Jam en mia olda Enciklopedio traktas tiun ĉi gravan bibliotekon, fonditan en 1922 kaj zorgflegatan de S-ro Montagu Butler. Se mi bone rememoras, jam tie oni menciis ĉ. 30 mil slipojn pri la biblioteko. Verŝajne el tiu ĉi datumo kelkaj menciis, ke la Biblioteko de BEA ( nun ĝi nomiĝas Bibl. Montagu Butler) havas tiom da jarkolektojn. Ne, en la katalogo ~~tiam~~ oni
6 trovis tiam ĉ. 30 mil, hodiaŭ c. 60 mil slipojn. Ili prezentas al ni ĉ. 11 mil librovolumojn kaj ( en 1980, laŭ M.Ĝivoje) 1240 kompletajn jarkolektojn de E-periodaĵoj ( 359 titoloj). Koncize: ĝi ne apartenas al la tri plej grandaj E-bibliotekoj de la mondo.

7 La tri plej granda E-biblioteko de Britujo troviĝas en Northhampton, kaj ĝi estas privata biblioteko de D.B. Gregor. Laŭ la ricevita tajpita katalogo ĝi enhavas 1000 volumojn ( kune kun la gazetoj, cetere tre malmultaj en la kolektaĵo ).

La sekva biblioteko verŝajne havas pli ol mil bibliografiajn unuojn en aŭ pri Esperanto. Dank' al sindona kaj persista laboro de F-ino Marjorie Boulton, nia elstara poeto, ni scias, ke el la libroj aperintaj ĝis la jaro 192o la fama <u>Bodleja Biblioteko</u> 8
<u>de Oxford</u> havas 191 titolojn ( Lencias Ĝivoje ). La aliaj kelkcent katalogoj ... — jam tajpitaj — certe enhavas novajn centojn de E-titoloj, aŭ ĝenerale planlingvistikajn titolojn.

Kiel ni ĉiuj scias , Bulgario jam en la komencaj jaroj de nia lingvo apartenis al tiuj landoj, kie aperis E-libroj kaj periodaĵoj.
En la ĉefurbo, en <u>Sofio</u> , laŭ la verkistoj de Esperanto en Perspektivo ( p.68o) troviĝas 11,5 mil libroj en aŭ pri Esperanto. Mi certas, ke tiu ĉi informo estas erara. Verŝajne maksimume 2-3 mil volumoj estas konsulteblaj en tiu renoma <u>biblioteko "Kiril i Metodi"</u>. 9

Samurbe oni povas viziti <u>Esperanto-Muzeon</u>, kun pli ol mil libroj kaj ĉ. tricent kompletaj jarkolektoj. 10

En <u>Ĉeĥio</u> nia movado ĉiam havis tre multajn disĉiplojn. La forta movado bezonis rapide akireblajn kaj certajn informojn pri la alilandaj E-movadoj, pri la aktuala literaturo, pri la historio de la movado. Tiujn informojn oni povas akiri nur pere de grandaj kaj bone zorgitaj bibliotekoj. Tiujn oni trovas en kelkaj urboj de Ĉeĥio. En Brno eĉ du el ili troviĝas : la <u>biblioteko de la Esperanto-Klubo</u> ( jam 9o-jara!) , tie oni povas konsulti 15oo volumojn. 11
Informatika fakulo Zdenek Hršel jam ... de jardekoj serioze kolektas E-librojn kaj periodaĵojn kaj ne sen rezulto : en lia hejma biblioteko oni trovas 15oo volumojn ( bretlongo 16 metroj!). Ankaŭ la 12
biblioteko de S-ro Josef Vondroušek estas granda. 13

La asocia biblioteko de ĈEA, en Praga nun portas la nomon 14
<u>"Biblioteko Tomaŝ Ŝustr"</u>. Estis li, kiu prizorgis, savis kaj ampleksigis tiun ĉi bibliotekon, fonditan antaŭ multaj jardekoj.

La olana evoluo de la biblioteko nun stagnas, mankas loko, mono por prizorgado kaj eble forestas ankaŭ la legantoj... Sed tiu ĉi situacio ne nur en Prago donas solvendajn taskojn al niaj gvidantoj... Se ie oni sukcesis kolekti pli ol 6 mil ( 6,1 mil ) volumojn da E-libroj, oni devas tiun riĉan kolektaĵon savi, ja ties valoro estas neanstataŭigebla.

Ĉinio

La amason de nia nuntempa movado certigas niaj ĉinaj gesamideanoj. La renoma revuo "El Popola Ĉinio" havas multajn milojn da
15 legantoj dise en la mondo. La redakcio havas ampleksan bibliotekon, ĉ. 2 mil-voluman. Sen informoj oni ne povas informi, ĉu ne ? Do, Pekino, ne nur pere de siaj radio-dissendoj estas konata en Esperantujo.

Danio

Post grandioza lando sekvas eta en la prelego, Danlando , kun multaj interesaj eroj el la historio de Esperanto. Laŭ la alfabeta listigo mi mencias unue la Popolbibliotekon ( nun Komunan Bib-
16 liotekon) de Århus. La unua katalogo libroforma ( 1956) menciis nur 700 titolojn, sed post 20 jaroj jam duoble pli. Nun jam oni trovas en tiu biblioteko pli ol 2 mil volumojn. Cetere ĝi estas prunta biblioteko, bv. eluzi tiun ĉi eblon. Specialan lokon okupas la ĉefurbo, Kopenhago, en la vico de "bibliotekaj urboj " de Esperantujo. Vi trovas tie ĉiujn tipojn de la bibliotekoj esperantaj: asocian ( Biblio-
17 teko de Kopenhaga E-Klubo kun 2 mil volumoj), privatajn ( Bibliotekon
18 de Gesinjoroj Kühlmann, ĉ. 1,2 mil volumoj, zorge aranĝitaj kaj jam testamentitaj al la Reĝa Biblioteko, kie oni trovas same pli ol mil volumojn. Mi jam legis en diversaj E-periodaĵoj, ke post la morto de nia Paul Neergaard, ankaŭ lia tre riĉa biblioteko ( ĉ. 5,5 mil libroj)
19 apartenas al tiu renoma biblioteko de Kopenhago. Dank' al invito de nia dana samideanaro, mi havis la feliĉon ( inter la prelegoj ) viziti la menciitajn ĉefurbajn bibliotekojn. La fakuloj prizorgis ankaŭ pri la vizitoj al la iama Neergaard-a biblioteko.. Ĝi jam ne trovis lokon en la centra ejo, sed en bona , vizitebla kaj konsultebla loko ĝi troveblas...

Finlando

Alia skandinavia lando sekvas en la listo: Finnlando. En Espoo trovîgas la plej granda E-biblioteko de la lando ( ĉ. 1,5 mil volumoj ), la dua en urbo Kuopio ( 1,2 mil volumoj ) , do nekutime, la ĉefurbo ricevos maksimume la bronzan medalon en tiu ĉi mensaj-kulturaj olimpiaj ludoj... 20 21

Francland

Laŭ la alfabeto ni atingis Francion. Tiu ĉi lando, respektive ĝiaj esperantistoj rolis tre decidan kaj signifan rolon en la historio de la internacia lingvo. Kaj ni ne pensu nur pri la "Delegitaro...". Mi estas certa, ke minimume dek libraroj troviĝas en tiu granda lando kun amplekso de pli ol mil volumoj. Jen tiuj, pri kiuj mi havas informojn : Kultura Centro de Angers havas nun 22
1200 malsamajn librojn kaj broŝurojn. La prizorganto en sia privata biblioteko posedas proksimume 500 lernolibrojn kaj librojn en aŭ pri E-o. La Biblioteko de Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj 23
( en Baugé-Gresillon) entenas ĉ. 1600 erojn, ne enkalkulante la revuojn kaj aliajn periodaĵojn.

Antaŭ 16 jaroj estis fondita Nacia Esperanto-Muzeo en urbo 24
Gray. En formo de konstanta ekspozicio estas konsulteblaj multaj miloj de diversaj esperantaĵoj ( ĉ. 3000 eroj ) , sed mankas katalogo. La ekspoziciejo iam estis lernejo, kaj ampleksas 230 kvadratmetrojn ( 8 salonoj ).

Unu el la plej malnovaj E-bibliotekoj troviĝas en Lyon. La 25
loka E-klubo post 35-jaroj, en 1939 donacis la bibliotekon al la Urba Publika Biblioteko, kie ĝi nun troviĝas, kaj viziteblas. Oni ne povis ĝis nun akiri informojn pri la amplekso de la biblioteko, same ne pri la E-enhavo de Biblioteko de Nico, kie troviĝas multaj manuskriptoj de 26
Petro Stojan.

En Parizo, en la centro de la E-movado antaŭ la 1-a mondmilito, 27
oni trovas nun la asocian bibliotekon de niaj francaj samideanoj: 2800 libroj kaj broŝuroj troviĝas en la Biblioteko de UFE.

La listo de franclandaj E-trezorejoj ankoraŭ ne finiĝis...
Ĉ. mil volumoj troviĝas ankaŭ en la privata biblioteko de S-ro Jean
28 Amouroux, kiu speciale okupiĝas pri malnovaj manuskriptoj de elstaraj movadanoj kaj verkas pri ili eminentajn artikolojn. Por tio li prezentas al ni ekzemplon pri kvalita, elstara laboro.

Germanio

Ankaŭ en Germanio oni trovas multajn E-librarojn kaj ne
29 malgrandajn! En Aalen troviĝas unu el la plej ampleksaj E-bibliotekoj ( ĉ. lo mil libroj kaj kelkmil periodaĵoj ). Adolf Burkhardt kaj Johann A. Pachter faris multon por unuigi, katalogizi kaj ampleksigi tiun ĉi gravan bibliotekon.

30 En la Germana Ŝtata Biblioteko ( Berlin) oni povas konsulti 28oo librojn kaj broŝurojn. Ili parte devenas el la Biblioteko de la iama Germana E-Instituto, estrita de D-ro Dietterle. Kaj slipa kaj tajpota katalogo estas studebla.

31 Biblioteko de la iama Centra Laborrondo en Kulturligo ampleksas
32 ĉ. looo volumojn. La privata biblioteko de D-ro Detlev Blanke havas iom pli ( ĉ. 1,5 mil volumojn), krom brilan katalogon de interlingvistikaj artikoloj ( verŝajne unika en la mondo !), studĉambron, kopiilon. Kion vi bezonas ankoraŭ, se vi serioze volas studi en iu biblioteko?!

La privata biblioteko de Rudolf Kratzmann ( ĉ. looo volumoj) ne
33 troviĝas en la centro de la interesiĝoj, ja ĝi troviĝas en provinco,
34 en Griessbach im Rottal. La asocia biblioteko de la E-Klubo de München ankoraŭ nom pli ol lo-jara estas, sed jam la volumaro proksimiĝas al la cifero 2 mil. Fondis ĝin Johann A.Pachter. Lia privata biblioteko
35 estas konsultebla nun en Sigmaringen ( 1,5 mil volumoj).

En Saarlando oni trovas du grandajn E-bibliotekojn: en la Uni-
36 versitata Biblioteko de Saarbrücken ( ĉ. 1 mil volumoj) kaj la pli ampleksan ( 3 mil voluman) privatan bibliotekon de D-ro Reinhard Haupenthal.
37

Hispanio

Nun miliardoj da homoj ĉiutage aŭskultas kaj rigardas informojn en Barcelona, el la olimpika urbo. En la proksimeco de la kataluna ĉefurbo , troviĝas malgrandaj urbetoj San Pau d' Ordal kaj 38
Loia. Ili daŭre kaj jam de longa tempo signifas por studemuloj—esperantistoj gravajn centrojn. En Loia vivis nia karmemora Ramon Molera, kiu jam antaŭ 3o jaroj diligente serĉis mankantajn numerojn de diversaj maloftaj E-periodaĵoj, por kompletigi jarkolektojn ... 39
Post lia morto, de 1983, daŭrigas lian laboron la filino, Ana Maria Molera Urgellés. Cetre ŝi estas fakulo, bibliotekisto. Laŭ la plej freŝe senditaj informoj la Biblioteko "Ramon Molera " enhavas 3548 librojn kaj 4585 kompletajn ( krome 3251 nekompletajn) jarkolektojn de planlingvaj periodaĵoj. Do, entute pli ol 8 mil volumojn...!

La plej granda E-biblioteko kaj muzeo de la Iberia duoninsulo estas konsultebla en San Pau d'Ordal. Lia fondinto, S-ro Luis 39
Ma Hernandez Yzal, ne nur kolektis proprakoste pli ol 14 mil volumojn, sed por la trim E-biblioteko de la mondo li konstruigis ankaŭ ejon: kun gastĉambro! Oni ne diru, ke en Esperantujo oni ne prizorgas studemulojn!! La Hispana Esperanto-Muzeo komence funkciis en la selonego de la malnova apoteko, en la nova konstruaĵo ĝi funkcias ekde 1974. 2oo kvadratmetroj , ĉie esperantaĵoj, aranĝitaj laŭ arta gusto. Ĉion realigis al nia geedza paro, kiujn mi speciale salutas inter la aŭskultantoj!! Precizaj indikoj: 8148 libroj;6133 kompletaj kaj 5115 nekompletaj jarkolekto

Hungario

Apartan saluton meritas ankaŭ Károly Fajszi, el Budapesto. 40
Preskaŭ samgranda biblioteko: 9ooo libroj kaj 4 mil kompletaj jarkolektoj de periodaĵoj. Kiel ni scias, pri la unuaj 5 mil libroj aperis detala, vere science prilaborita katalogo ( la sola tia en Esperantujo) . Ankaŭ lin kaj lian kunlaborantinon, koleginon, s-rinon Lajosné Pataki mi elkore salutas ĉi tie!

41 Pli ol 7 mil bibliografiaj unuoj ( volumoj) estas konsul-
teblaj en la privata biblioteko de la prelegánto. Ekde 1957 mi
kolektas librojn Esperantajn, en la lastaj 2o jaroj ĉefe perioda-
ĵojn. El la lastaj 4,4 mil kompletaj jarkolektoj staras je mia
dispono, plejparte senbindaĵo.

42 D-ro Vilmos Benczik havas en sia privata biblioteko ĉ.
2 mil librojn kaj kelkcent kompletajn jarkolektojn de la ĉefaj E-
43 revuoj. Jenő Zágoni, bibliotekisto, antaŭ 2 jaroj translokiĝis el
Transilvanio al Budapeŝto kune kun ĉ. 2 mil volumoj de Esperanta-
ĵoj. Pli ol 75%-os de la kolekto estas libroj. Ne nur privatuloj
havas bibliotekon Esperantan en la hungara ĉefurbo: la plej for-
44 ta faka sekcio de la Hungaria E-Asocio, la Fervojista Fako eldo-
nis katalogon de sia Centra Biblioteko . La aŭtora katalogo men-
cias pli ol 12oo volumojn, krome ili havas ĉ. 3oo kompletajn jarko-
lektojn de ( ne nur fakaj ) revuoj. Laŭ mia konjekto — mi anko-
raŭ ne finis la kontroladon de la slipoj — en la Landa Biblioteko-
45 Széchenyi , en Budapest troviĝas ĉ. 9oo E-libroj kaj ĉ. 5oo komple-
taj jarkolektoj de planlingvaj ( lingvistikaj) periodaĵoj. Preskaŭ
tiom da volumoj troveblas pri la sama tereno en la Ŝtata Fremdlingva
46 Biblioteko ( el 13oo bibliografiaj unuoj ĉ. 1ooo estas libroj). Ĉe la
47 fino de la budapeŝta listo troveblas la Biblioteko de Hungaria Espe-
ranto-Asocio ( 6oo libroj kaj 46o kompletaj jarkolektoj ) kaj la
48 Biblioteko de la E-fako de la Universitato ELTE ( ĉ. mil volumoj).
49 S-ino Ada Csiszár prizorgas nun la Bibliotekon Kalocsay-Csiszár,
alinome KAL-ĈI-Dokumentaro. Ĉ. 8oo libroj kaj 25o kompletaj jarkolek-
toj de la gravaj literaturaj revuoj ( LM, HLR, MP, HV, LF ktp.)
troviĝas en tiu privata biblioteko.

50 En la privata biblioteko de D-ro Sándor Szénási, profesoro
pri teologio en Eger estas 75o libroj kaj ĉ. 25o kompletaj jarkolek-
toj.

Kiel konate, la Hungara Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko 51
troviĝas en Szeged, dank' al iniciato de Ernő Farkas. La institucio eldonis bonan katalogon pri la unuaj 1,5 mil libroj. Nun HEMB povas fieri pri 359o libroj kaj ĉ. 6oo kompletaj jarkolektoj de E-periodaĵoj. Prizorgas ĝin fakulo, bibliotekistino Edit Takó. Samurbe Vi trovas alian gravan kolektaĵon, en la hejmo de D-ro 52
Árpád Rátkai ( 12oo libroj, ĉ. 5oo kompletaj jarkolektoj ). La materialo koncernas ĉefe movadhistorion.

Verŝajne ĉiuj ĉeestantoj konas la nomon de nia akademiano,
Bernard Golden, el urbo Veszprém. Lia labor-biblioteko estas por 53
propra uzo. Ĝi entenas 12oo librovolumojn, 29o periodaĵo-volumojn kaj ceterajn Esperantaĵojn. La materialo konsistas ĉefe el konsultlibroj, faklibroj, beletro, lernolibroj, verkoj pri interlingvistiko , planlingvistiko.

Se Vi adicias la rezulto jenas : en Hungario troviĝas (8.40 mil volumoj) plej multe da E-bibliotekoj kaj plej multaj verkoj/resp. periodaĵovolumoj en diversaj bibliotekoj ( ĉefe privataj).

Israelo

Pri Izraelo mi ne havas precizajn datumojn. Mi konjektas,
ke en la privata biblioteko de S-ro Mihaelo Kárpáti estas ĉ. 1 mil 54
volumoj.

Italio

Pri Italiaj E-bibliotekoj raportas la menciitaj literaturaj fontoj: En Ascoli Piceno , en la privata biblioteko de Maria 55
Grazia Brandimarte estas ĉ. 1 mil volumoj ( 80-os en formo de
libroj ). Samgranda kolektaĵo troviĝas en Bologna Komuna Biblio- 56
teko. S-ro Lanfranco Bonora kompilis kaj aperigis tre belan kaj altnivelan katalogon pri la enhavo.

La grava manlibro de Ĝivoje ne donas precizajn ciferojn
pri la privata biblioteko de prof. Elio Migliorini. La menciita 57
12 metroj de bretlongo egalas ĉ. mil volumojn.

Ni ankoraŭ ne finis la priskribon de la italiaj biblio-
58 tekoj, ja ankaŭ la Triesta E-asocio havas konsiderindan kolek-
59 taĵon, krome en Udine, en la Komuna Biblioteko "Vincenzo Joppi"
oni povas studi ĉ. 3 mil librojn se ili ne troviĝus en fermitaj
kestoj.

Japanio

Por kelkaj minutoj ni forlasas Eŭropon. Ĉiam tre grava es-
tis por la E-movado la disvastiĝo de E-o inter japanoj. En Nagoya
60 Esperanto-Centro oni povas konsulti bibliotekon de 2000 volumoj
75 %-oj en formo de libroj). La ĉefurba Biblioteko de Japana Es-
61 peranto-Instituto havas pli, ĉ. 3 mil volumojn. La bibliotekon
multfoje prizorgis fakulo.

Jugoslavio Serbio

62 En Beograd la societa biblioteko konsistas el la iama pri-
vata biblioteko de s-ro Vajdlik ( 1 mil volumoj).En la macedona
63 urbo Prilep la E-Societo "Progreso" havas 1-mil voluman biblio-
tekon.

Unu el la plej grandaj privataj bibliotekoj apartenis al
64 S-ro Marinko Ĝivoje ( pli ol 5 mil volumoj). La vidvino prizorgas
nun la bibliotekon. Parton ŝi jam vendis...

Kroatio

Konsiderindan nombron de E-volumoj havas ankaŭ nun la Uni-
65 versitata Biblioteko de la kroata ĉefurbo, Zagreb. En la asocia
66 biblioteko de Societo "Lude Borjan" vi trovas kompatile katalogizi-
tajn mil volumojn.

Kanado

La alfabeta ordo denove transflugis kun ni al la alia bordo
67 de la Atlantiko: en Kanado la fontoj parolas pri du gravaj E-bib-
liotekoj: Nia akademiano Rüdiger Eichholz, en Bacliboro havas ĉ.
mil librojn kaj ĉ. 300 kompletajn jarkolektojn de E-periodaĵoj.
Laŭ la Jarlibro ( 1971, 2-a parto, p.110-114 ) en Ottawa troviĝas
68 E-biblioteko kun ĉ. 2,5 mil eroj. Estas interese, post 9 jaroj M.
Ĝivoje jam ne mencias tiun grandan bibliotekon. Kio pravis?

Nederlando

En la domo de Universala Esperanto-Asocio, en Roterdamo (Nederlando) troviĝas la dua plej granda biblioteko de Esperanto. Kvankam nek pri la libroj, nek pri la periodaĵoj oni preparis katalogon, en la "Biblioteko Hodler" estas konsulteblaj ĉ. 10 mil volumoj da libroj kaj broŝuroj krom ĉ. 5 mil kompletaj jarkolektoj de E-periodaĵoj. La historio de la biblioteko cetere datiĝas de 1908 (en 1913 SES vendis al Hector Hodler, kiu tiam estis 26-jarulo!). 67

Ni konas la Universitatan Bibliotekon de Amsterdamo (ĉ. 3 mil volumoj), tie oni uzas jam la komputilan sistemon. 70
Samurbe ankaŭ privata biblioteko atingas mil volumojn, ja la biblioteko de S-ro Alex d' Oliveyra havas tiom da valoraj volumoj en aŭ pri Esperanto. 71

Estu permesate nun citi unu alineon el la statuto de UEA: Ĝi jenas: " La Biblioteko de UEA kolektas ĉiujn konservindajn E-lingvajn presaĵojn kaj interesajn verkojn en kaj pri lingvoj internaciaj. Ĝi akiras ilin laŭeble el redakciaj ekzempleroj, donacoj kaj interŝanĝoj. Por la biblioteko kaj por materialo de E-ekspozicioj estu rezervata modesta [illegible] kredito en la buĝeto."

Norvegio

La Universitata Biblioteko de Oslo — ĉefe dank' al la iama privata biblioteko de Rolf Bugge-Paulsen jam estas tre ampleksa E-biblioteko, ja ĝi havas ĉ. 3 mil volumojn. La laboron prizorgas de 1983 bibliotekisto, s-ro Arbo Hoeg. Oni povas uzi ankaŭ katalogon de la kolektaĵo. 72

Pollando

En Pollando sufiĉe multaj E-kolektaĵoj estas konsulteblaj. La asocia biblioteko en urbo Cieszyn havas ĉ. mil titolojn, kun alfabeta kaj decimala katalogo. La biblioteko troviĝas en la Kulturdomo de la urbo. 73

74 La iama kongresurbo, Kraków havas Filian Bibliotekon de
Pola E-Asocio, Tenas pri ĉ. 1ooo volumoj. La saman kvanton oni
75 povas studi ankaŭ en la Universitato de Łódz. La fama Katolika
Universitato de Lublino havas E-fakon de sia Biblioteko, kun 3,5
mil libroj kaj 4,5 mil kompletaj kaj ĉ. 4 mil nekompletaj kolek-
toj. La kompletaj jarkolektoj 3/4-e estas binditaj! Nun — be-
daurinde — pro manko de E-oficistoj kaj ekonomiaj kialoj la in-
76 terŝanĝado ĉesis. En Torun, en la Universitata Biblioteko trovis
lokon antaŭ 25 jaroj la Biblioteko de I.S.A.E ( 1 mil volumoj,
15o jarkolektoj kaj kopioj de ĉ. 3oo sciencaj artikoloj).

77 La dua plej granda E-biblioteko en Pollando estas tiu de PEA
en la ĉefurbo: 23oo libroj kaj 32o kompletaj jarkolektoj. Prizor-
gas ĝin fakulo. Ni povas konsulti alfabetan katalogon kaj de la
libroj kaj de la periodaĵoj.

78 La asocia biblioteko en Vroclavo havas ĉ. 1 mil volumojn.
79 La privata biblioteko de Edward Wojtakowski estas ĉ. duoble pli
granda ( 224o volumoj). La lasta havas krome 1o9o kompletajn jar-
kolektojn de E-revuoj, do entute preskaŭ 3,3 mil volumojn, kaj
ĉiuj jarkolektoj estas binditaj!

Portugalo

La Biblioteko de la Portugala E-Asocio , en Lisbon konsistas
80 el ĉ. 1,6 mil volumoj. La privata biblioteko de Manuel Freitas en
81 Porto havas 1ooo bibliografiajn erojn. Iom pli granda estas la
biblioteko de Eduardo Padrao , en Villa Nova de Famalicao ( 116o
82 volumoj).

Rusio

En Ruslando nun ni scias nur pri du -tri gravaj E-bibliotekoj.
83 En Jakaterinburg ( iama Svedlovsk) la asocia biblioteko superas
84 1,5 mil volumojn; en Ufa, Boris Kolker havas ĉ. 1-mil-voluman
85 bibliotekon, simile grandan posedas en Moskvo S-ro Boris Tokarev.
Estas indikoj pri tio, ke la Ŝtata Biblioteko en Moskvo ( Biblio-
86 teko "Lenin", Frendlingva Fako ) havas ĉ. 2 mil Esperantaĵojn.

Slovakio

En Bratislava, en la slovaka ĉefurbo troviĝas kluba (asocia) 87
biblioteko de 2-3 miloj da volumoj. En la nova organiza centro,
en Poprad, la Slovakia E-asocio havas ĉ. 2 mil voluman bibliote- 88
kon.

Slovenio

Ne estas sen E-biblioteko ankaŭ la alia nova lando de Mez-
Eŭropo: en la slovena ĉefurbo, en Ljubljana la Studbiblioteko de 89
Slovena E-Ligo havas ĉ. 1000 titolojn ( libroj kaj broŝuroj).

Svedio

En Svedio oni trovas kelkajn pli ol mil-volumajn E-biblio-
tekojn. La Biblioteko de Klubo Esperantista de Malmö havas ĉ. 90
2,5 mil librojn, krome multaj kompletajn jarkolektojn de diver-
saj E-gazetoj kaj revuoj. Ili aperigis jam katalogon pri la gra-
va kolekto. En la privata biblioteko de s-ino Ana Sandgren oni 91
trovas ĉefe religiajn librojn kaj revuojn. Ili ( geedza paro)
aperigis antaŭ jardeko bibliografion de la religiaj revuoj.
La biblioteko troviĝas en Östansjö (Hallsberg).

Kiel decas, la plej granda E-biblioteko apartenas al
la landa asocio: Biblioteko de Sveda Esperanto-Federacio en- 92
havas 2,3 mil librojn kaj broŝurojn.

Pri la privata biblioteko de Bengt Alsen mi ne havas fre-
ŝajn datumojn. Laŭ L.Ĝivoje , en 1980 S-ro Alsen posedis 650 93
librojn kaj 139 kompletajn jarkolektojn. Nun la kolektaĵo eble
jam superas mil volumojn. Ĝi loĝas en Skövde.

Svisio

Unu el la plej gravaj studcentroj de la interlingvistoj 94
estas en La Chaux-de-Fonds (Svisio). CDELI celas okupiĝi pri
serĉado, konservado, klarigado kaj studado de libroj, broŝuroj,
revuoj kaj aliaj dokumentoj koncernantaj al planlingvaj problemoj"
( citajo el la statuto). Antaŭ lo jaroj ili havis ĉ. lo mil
bibliografiajn unuojn pri la menciita temo.

Onidire ankaŭ en Zürich estas 1-mil-voluma E-biblioteko. 95

Urugvajo 96 En Sud-Ameriko en Montevideo (Urugvajo) estas la plej granda E-biblioteko ( ĉ. 2,5 mil eroj ).

USA

97 En Eugene, en la Universitata Biblioteko de Oregon, dank' al la donaco de s-ino Connor antaŭ 15 jaroj fondiĝis E-fako. La biblioteko prizorgis pri inda, serioza katalogo pri la akiritaj 3 mil volumoj.

98 En New York oni povas studi Esperantaĵojn en mil-voluma biblioteko de ~~XXXXXXXXXXXX~~ iu el la publikaj bibliotekoj kaj en ti[illegible] d-ro Julius Balbin.

99 La landa asocio (ELNA) krom la kutimaj ~~[illegible]~~ libroj kaj periodaĵoj prizorgas ankaŭ pri sonaj materialoj ( pli ol 500 bendoj ). ELNA havas ankaŭ arkivon.

1992-07-30